

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

April 1945

33 årg. Nr 4

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## SEF:s kongress i Stockholm.

Under pingsten den 19—21 maj hålles SEF:s kongress i Stockholm. Kongressens adress är: "Esperanto-kongressen", Tegelbacken, Stockholm. Kongressens särskilda postgironummer: 56463. Kongresslokaler bli Stockholms Högskola, Norrtullsgatan 2, samt Stockholms Högskolas studenters kårhus, Holändaregatan 32—34.

### PROGRAM

#### LÖRDAGEN DEN 19/5.

Kongressens högtidliga öppnande. Festsupé.

- Kl. 13.00 Kongressbyrån öppnas i SEF:s sekretariat, Tegelbacken.  
Kl. 16.00 Stockholms Högskolas C-sal, Norrtullsgatan 2, ställes till kongressens förfogande.  
Kl. 17.00 Svenska Lärares Esperanto-Förbunds årsmöte.  
Kl. 18.00 SEF:s styrelse sammanträder.  
Kl. 19.00 Kongressens högtidliga öppnande.  
Kl. 20.30 Interkonatiga vespero i Studenternas kårhus.

Festsupé.

Gäster och ombud ha tillfälle att överbringa hälsningar. Utdelning av förbundets diplom för troget medlemskap.

Angenäm samvaro med dans till kl. 02.00.

#### SÖNDAGEN DEN 20/5.

Kongressförhandlingar. Varia vespero, samkväm.

- Kl. 09.00 Förlagsföreningen Esperanto:s årsmöte.  
Kl. 10.00 SEF:s årsmöte fortsätter.  
Kl. 12.30 Lunchpaus.  
Kl. 14.00 SEF:s årsmöte fortsätter och avslutas.  
Kl. 18.00 Paus.  
Kl. 20.00 Samkväm — Varia vespero.

#### MÅNDAGEN DEN 21/5.

- Kl. 09.30 Gudstjänst i Vallhallakyrkan, Mäster Samuelsgatan 57, predikan av ordföranden i K.E.L.I. Ivar Karlsson.  
Kl. 10.30 Kyrkkaffe.  
Kl. 11.30 Rundvandring på Skansen.

#### Kostnader.

##### Kongressavgift.

Deltagarebiljett för SEF:s årsmöte kr. 5: —. De, som icke kunna delta i kongressen, men ändå önska stödja densamma, ombedes insätta halv kongressavgift, kr. 2: 50, å kongressens postgironummer: 56463, varvid de erhåller samtliga kongresshandlingar. Deltagareavgiften insändes senast den 10 maj till: Esperanto-kongressen, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro: 56463.

##### Supéer:

19 maj kl. 20.30 å Studenternas kårhus, kr. 6: 75 inkl. betj.-avg. (Kuponger: 2 st. bröd-, 2 st. smör- och 8 st. köttkuponger.)

##### Kostnader för rum å hotell eller pensionat.

###### Större hotell:

Dubbelrum ..... kr. 10: — — 12: —  
Enkelrum ..... kr. 5: 50 — 7: 50

###### Mindre hotell och pensionat:

Dubbelrum ..... kr. 8: — — 9: —  
Enkelrum ..... kr. 4: 50 — 5: —

## E L F I N N L A N D O.

### FINNA NACIA EPOSO KALEVALA ESPERANTIGITA.

Nia korespondanto intervjuis la tradukinton de tutmonde konata finna nacia epopeo Kalevala, inĝenieron Ilmari Ekström, Turku, kaj ricevis de li la sekvantan respondon.

"Jes, mi tradukis nian epopeon en Esperanton kaj donacis la manuskripton al Kalevalaseura (Kalevala-societo). Estas evidente, ke tiel grandan verkon kiel estas Kalevala, oni ne povas facile eldoni, precipe en nuna tempo. Mi donis la tradukon al Kalevalaseura, ĉar mi opiniis, ke tiu ĉi societo povas helpi en eldono kaj havas ankaŭ intereson por tio. Ankaŭ estas klare, ke la verko estas tiel grava, ke estas bezonata severa kritiko kaj ankaŭ trastudo per aliaj kompetentuloj aŭtoritataj kaj tian povas, mi kredas, plej bone organizi la nomita societo. Mia traduko estas nur la komenco kaj eble grundo por novaj laborantoj en la sama fako.

La ideon al mia traduklaboro mi ricevis en la 100-jara festotago de Kalevala. Dum dek jaroj mi laboris kun ĝia tradukado. Nature estis paŭzoj, iam eĉ longaj, multaj monatoj, sed iam estis la laboro tre intensiva dum vesperoj, dimanĉoj kaj someraj libertempoj. Unue min interesis Kullervokantoj kaj mi tradukis ilin unue. Poste mi tradukis la lastan kanton, Marjatta-kanton, kaj kiam ĝi estis preta, mi komencis sisteme el la komenco. La tuta traduko estis preta en novembro 1943 post

kiam komenciĝis la netskribado per maŝino kaj samtempe la unua trarigardo. Tiu ĉi laboro daŭris tutan jaron. Mi uzis nature la originalan versformon, do trokeon, kaj la versoj estas oksilabaj kiel la originaj. La traduko estas laŭvorta kiom eble, kaj bedaŭrinde tial oni ne povas uzi aliteracion, escepte en kelkaj malmultaj lokoj."

**Kunveno de abstinaj esperantistoj** okazis ĉe la stacio Toijala anuncon la 24/III kune kun la tutlanda kongreso de l' abstinaj fervojistoj. Ĉe la enhavoriĉa kaj bonege sukcesinta kongreso staciestro H. Salokannel faris prelegeton pri Esperanto menciante, ke la Internacia Ligo de Abstinaj Fervojistoj jam akceptis Esperanton kiel permesatan lingvon. Tial ankaŭ la finnaj abstinaj fervojistoj eklernu la lingvon! Nova flugfolieto estis disdonata al la ĉeestantoj.

"**La triumfa procesio de la internacia lingvo**" estas la nova flugfolieto, eldonita de staciestro Salokannel. Ĝi estas finnlingva kun esperanta rubriko!

**Bontemplanaj esperantistoj**, bonvenon al Punnaharju la 8—14/7! Partopreno kun loĝo kaj manĝo kostas nur 60 kr.

"**La Vendreda Klubo**" en Kouvola jarkunvenis la 18.3. Oni aŭdis raporton pri la estinta jaro. La kunveno opiniis, ke kiam la nuna terura milito finiĝos, la homaro pli urĝe bezonos lingvan ilon por internacia kultur- kaj ekonomia vivo. Espreble la milito sufiĉe klare montris al la mondo, kien kondukas blinda nacia fiereco k. ŝaŭvinismo. — — — La kunveno decidis aranĝi en venonta aŭtuno Esperantan kurson almenaŭ por komen-

#### Grupplogi:

Rum med 5 à 6 bäddar ..... kr. 4: — per bädd

Till dessa avgifter tillkommer 50 öre per person i anvisningsavgift.

**OBS!** På grund av den rådande stora rumsbristen i Stockholm måste anmälan om rum vara kongressbestyrelsen tillhanda senast den 1 maj. För senare inkomna rumsanmälningar ikläder sig kongressbestyrelsen intet ansvar.

#### KONGRESSBYRA.

Den 19 maj kl. 13.00 öppnas kongressbyrån i Svenska Esperanto-Förbundets sekretariat, Tegelbacken. Kongressdeltagarna uppmanas att snarast möjligt anmäla sig där för att erhålla kongresshandlingarna och utlösa beställda biljetter samt erhålla anvisningar om logi m. m. Om närmare upplysningar om kongressen skulle önskas kan sådana erhållas hos kongresskommittén under adress: Esperanto-kongressen, Tegelbacken, Stockholm.

#### ANMÄLNINGAR.

Av vad som framgått av ovanstående skall alltså anmälningar och rekvisition av deltagarebiljetter ske skriftligt före den 10 maj under adress: Esperanto-kongressen, Tegelbacken, Stockholm.

Kongressavgiften insändes till samma adress, postgirokonto 56463.

Anmälningarna böra ske å brevkort och helst enligt nedanstående formulär.

Till SEF-kongressen i Stockholm 19—21/5 anmäler sig

1) namn .....  
titel, yrke .....  
postadress .....

2) namn .....  
titel, yrke .....  
postadress .....

..... st. kongressavgifter à 5 kr. = ..... kr.  
insatta å postgiro 56463.

Beställes:

..... st. supé 19/5 à kr. 6: 75

..... st. supé 20/5 à kr. 3: —

Logi önskas till ungefärligt pris: ..... (se under rubriken Kostnader). Ankomst till Stockholm med tåg kl. .... den .....

#### Kr. 5: —

Kongressavgiften är som synes dubbelt så stor i år som tidigare. Detta är enligt förra årsmötets beslut, och syftet därmed är, att halva kongressavgiften i fortsättningen skall avsättas för att ge förbundet medel att följande år lämna bidrag till valda klubbrepresentanters resekostnader.

cantoj, eble ankaŭ por aliaj espistoj. — Oni esperis, ke la anoj de la klubo partoprenos la internacian tendaron en naturbelega loko Punkaharju en venonta monato Julio. — Kiel prezidanton oni reelektis instr. Svante Kivinen kaj kiel sekretario telegrafan ĉefon Vilho Holopainen.

W. H:nen.

## Veiko Johannes.

(Daŭrigo)

Rakonto de Einar Wallquist. Trad. Hj. Dahlén.

La patrino de Veiko Johannes eble estis la plej elĉerpita. Pli ol la zorgoj pri la naŭ infanoj, la plej juna ankoraŭ ne unujara, ŝiajn fortojn konsumis sangadoj dum la tuta migrado trans la montegaron. Ŝia vizaĝo estis vaksolora. Melankolie ŝi ĉirkaŭrigardis, kiel ŝi kalkulas kaj ree kalkulas la infanojn. Veiko Johannes daŭre dormis sur ŝiaj genuoj, bonstata kaj malmulte influita de la veteraj malfacilaĵoj. Li plene eluzis sian rajton dormi, kaj nun li bone orientis sin tiel kiel povas fari dujarulo ankaŭ post tago kun multe da freŝa aero kaj ŝanĝantaj imprezoj.

Fine la pasportaj fomalaĵoj pretiĝis. La lacaj homoj pendaĉis sur siaj seĝoj kun grizaj vizaĝoj kaj pezaj palpebroj. Ni helpis ilin eksteren al la atendanta aŭtobuso. Ni devis vojaĝi plu 15 kilometrojn al la vilaĝo Jäckvik antaŭ ol estis eble doni al ili tre necesan kaj bone preparitan vespermanĝon. Sed por tio estis tie dometo pretigita. Kiam la plenplena aŭtobuso ekmoviĝis, aperis pli ol unu rideto ĉe la lipoj. Iu el la knabinoj diris solene:

— Vojo! Ni estas sur vojo.

Tamen ne estis pli ol kelkaj tagnoktoj post kiam ili forlasis la lastan norvegen vojpecon. Tiuj tagnoktoj certe estis enhavoriĉaj kaj longaj.

Ni haltis ĉe la manĝigdomo. La pli multaj ne povis multe manĝi. La infanoj ploris kaj volis nur dormi. Tial ni baldaŭ kunpremiĝis en la aŭtobuson, kiu daŭrige rulis suben al la vilaĝaro. Ankorau restis je 65 kilometroj ĝis la enloĝejo en la preĝeja vilaĝo. Kiam ni ekvojaĝis de Jäckvik, la vojaĝantoj komence interesiĝis pri la pejzaĝo, sed ne daŭris longe antaŭ ol kapo post kapo kliniĝis kontraŭ la ŝultro de la najbaro. Baldaŭ la aŭtobuso similis al batalkampoj, kiam la dormo falĉis ĉiujn lacegajn rifuĝantojn, duone kuŝantaj unuj apud aliaj en la plej maloportunaj pozicioj. Sur miaj genuoj ripozis duongranda knabo. Poste mi sciiĝis, ke li estas bone provizita de fiinsektoj, sed tiaj estaĵoj ne kutimas prosperi sur mia malgrasa korpo kaj lasis min en paco ankaŭ nun. La bubo dormis neĝenita de bruo kaj turniĝoj. Li malofte turnis sin, grumble murmurante. Eble li kuŝis maloportune. Sed same rapide kiel li malfermis la okulojn, ili ree fermiĝis.

En la aŭtobuso baldaŭ malseketa disvastiĝis haladzo de malpuraj homkorpoj, respirado kaj malpuraj vestoj. La mizero, kiu sekvas misflegitajn homkorpojn kaj foresto de higieno. Ankoraŭ unu, kaj ne plej malgranda, malbeno de la fuĝantaj aroj! Tio iel plisentiĝis pro la malvarmeta aero, kiu tra la fenestraj fendoj enfluis el la printempa nokto tie ekstere, kies malvarma helo malmole kuŝis sur torditaj betuloj kaj bluetantaj neĝblova-

ĵoj. Tie ekstere estis brunaj la arboj burĝonoj, la birdoj kovis kaj la bestoj maltrankvile ĉirkaŭvadis. La naturo vekigis al nova vivo, tiun ĉi jaron kiel ĉiujn aliajn. La printempo estis venonta kun brilo kaj kreskado kaj svarmanta vivo inter trunketoj kaj en boskoj nezorgante pri tio, ke tiun ĉi nokton kelkaj senhejmaj homoj preterveturas, kiuj nenion deziras krom pacon en la mallumiĝanta mondo de la homoj. Ne koncernis tio la arban sukcon aŭ la virlagopojn sur la montdeklivoj.

La printempo venos — — — ĉijare kiel ĉiam.

Sube ĉe la enloĝejo atendis la memvole laborantaj virinoj. Nur pene ili povis enlitigi la infanojn. Tiuj apenaŭ maldormis, kiam ili enstumblis, kaj ree ili endormiĝis, kiam oni ankoraŭ fortrenis de ili la malsekajn, malpurajn ĉifonojn. Ŝvitbano kaj haŭtflorado, depedikigo kaj ŝanĝo de vestoj devis esti prokrastata ĝis la venonta tago. Tamen nur malfrue en la nokto la helpantaj virinoj povis forlasi la dormoĉambrojn kaj la kuirejon de la enloĝejo. Tio okazis nur, kiam ĉie regis kvieto kaj trankvilo, kiam peza spirado kaj ronkado rakontis pri profunda dormo. Eble ankoraŭ tiam iu mizerulo maldorme cerbumis, ne provante dormi pro la multego de pensoj, incitita de ĝemoj de la kamaradoj aŭ la knarado de la litostabloj. Eble ankaŭ, ke iu etulo maltrankvile ĵetiĝis en sia lito kaj verŝis siajn kutimajn noktajn larmojn. Iu patrino paŝis trans la plankon kaj bone envolvis sian tusantan kaj ŝvitantan infanon. Fariĝis premvarme en la ĉambroj.

La sekvantaj tagoj inter tiuj senhejmuloj fariĝis memorindaj. Oni komencis kompreni, kio estas moderna milito. Al tio apartenas la skurĝobatoj al la malfortaj, la virinoj kaj la infanoj. Ilia eltenkapablo kaj vivovolo signifas multe por la fino.

Iom post iom oni konatiĝis kun tiuj timemaj, delikatsentaj estaĵoj, kiujn ventega ondo enĵetis en nian kvietan idilion en malproksima laponlanda paroĥo. Sorto post sorto elruliĝis. Oni estis fantompremata. Oni furiozis, suferis kun ili. Kiom ĝi utilis? Estis nur fakte tiel. — Oni nur povis helpi al ili daŭrigi la longan vojaĝon. Ĉiu kompreneble deziris atingi la ĉiam logaperantan celon. Oni volis hejmen. Paroli kun estraroj, paroli kun Stockholm, paroli kun Finnlando, demandi pri parencoj, aŭskulti al malfacilaj zorgoj, konsoli laŭ sia povo, honteme doni monbileton. Doni monon ja estas la plej malkara maniero helpi senrimedulon.

(Daŭrigo)

### PRESS-STOPP!

Äntligen ha vi lyckats träffa överenskommelse om ett nytt lager av de så efterfrågade

#### BORDSSTANDAREN

med text ESPERANTO och grön stjärna. Prima siden, kantad med guldsnodd och försedd med tofsar. Högelegant. En fin och ofta använd presentartikel vid bemärkelsedagar. Varje klubb bör ha ett bordsstandar för sammanträden och festliga tillfällen. 15×24 cm. Pris kr. 13:50 inkl. oms. och porto.

Flaggstång till d.o. Trevlig modell. Kr. 7:— inkl. porto och oms.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071

Stockholm 19

Postgäro 578.

## Longa Lingvo – Mallonga Lingvo.

F. Szilágyi.

Laŭ St. Engholm la eblecoj de esperanto, kiel poezia traduklingvo estas malpli grandaj, ol tiuj rilate al prozo, kaj tion oni devas akcepti, ne nur pri esperanto, sed entute pri ĉiuj ekzistantaj lingvoj; sed laŭ Engholm esperanto havas relative malfavoran pozicion, "ĉar ĝi estas tro multsilaba por ĝenerale permesi altkvalitajn poezitradukojn el malmultsilabaj lingvoj, ekz. el la angla, aŭ la nordaj".

Sed oni havas sian suspekton: ĉu la "longeco" de esperanto ne signifas samtempe kaj plej ofte espriman koncizigon kaj sekve la rezulto povas esti plus-minus nulo, aŭ nur en la konkretaj okazoj ĝi povas decidiĝi je la favoro de esperanto, aŭ ni diru je tio de la sveda lingvo. Mi mem neniam spertis, ke proza teksto en esperanto estas pli longa ol en la sveda. Pri poezio la afero povas esti en konkretaj okazoj alie, sed entute la poezio donas diversajn malfacilaĵojn al la tradukanto kaj ofte nur la hazardaj koincidoj povas helpi la tradukanton, same kiel la malo povas doni gravajn malhelpojn. Sed entute, se esperanto ne estas pli "longa" kiel lingvo en prozo, ĝi do same ne estas tro "longa" en la poezia traduklingvo.

Pri tio mi pensis jam pli frue. Ĉiu lingvo ja havas siajn avantaĝojn kaj male kaj esperanto ne estas escepto. Hodiaŭ hazarde mi komencis foliumi la hungaran originalon de la tre interesa verko de F. Karinthy: Vojaĝo ĉirkaŭ mia kranio — kaj mi rememoris, ke mi posedas ankaŭ la svedan tradukon de la sama verko kaj krom tio en la "Tria Rapsodio" aperis ĉapitro (Moni) el la sama libro. Tiu ĉapitro povus esti objekto por komparo kaj despli bone, ĉar ankaŭ la hungara lingvo estas lingvo kun finaĵa, afiksa sistemo, aglutina kaj sekve t. n. "longa" lingvo. La komparo inter la trilingvaj variantoj devas ja montri, ĉu la du longaj fakte estas pli longaj, ol la "malmultsilaba" sveda lingvo. La rezulto estis tre interesa.

La koncerna ĉapitro konsistas en la hungara originalo el 6966 literoj, en la esp. traduko el iom pli ol 7000 literoj, kaj en la sveda traduko la nombro de la literoj estas pli ol 8000 literoj! Tio ja estas tre interesa, sed tio rilatas nur la literojn. Sed kiel estas pri la vortoj? La nombro de la vortoj en la hungara originalo estas 157, la esp. traduko enhavas 188 vortojn, la sveda traduko montriĝas la plej vort-malŝpara kun 337 vortoj. Kion signifas tio? Se la du antaŭe menciitaj lingvoj povas esprimi la saman tekston (ne speciale hungarecan) kun tiom da vortogajno, tiu avantaĝo devas ja egaligi la eventualan malplimultecon de la silaboj en la sveda lingvo. Ni rigardu do la silabojn. Mi devas konfesi, ke mi iom satiĝis pro la nombrado kaj daŭrigis la esploron nur rilate la unuajn cent vortojn en la diversaj variantoj. La unuaj cent vortoj en la hungara originalo enhavas 266 silabojn, esperanto mobilizas por la sama celo 230 silabojn, sed la sveda lingvo nun gajnas klare per siaj 179 silaboj. Sed — per tiuj 179 la sveda traduko atingis nur la duonon de la teksto, kiam

la hungara kaj esp. variantoj estis jam ĉ. ĉe la 2/3-a parto. Kaj nun aldonu la eblecon de la apostrofado de la vortfina "o" en la poezio kaj vi spertos, ke ĝenerale la favoroj kaj malfavoroj egaligas unu la alian. En specialaj okazoj povas esti malfacilaĵoj, sed la tradukoj de Engholm estas klara pruvo pri tio, ke virtuoza forto povas venki plej ofte eĉ tiajn. Supozeble esploro pri la angla lingvo donus al la supra preskaŭ similan rezulton, ĉar ankaŭ ĝi ŝtopas pli da vortoj en la frazojn ol esperanto, kvankam la vortoj mem ofte estas malmultsilabaj. La rezulto ankaŭ tie devas esti proksima al la plusminusnulo.

Engholm ne ŝatas la troan uzon de la apostrofado, ankau mi ne, sed mi ne volas preterlasi la okazon menci, ke ankau en aliaj lingvoj ekzistas mallongigaj rimedoj en la deklamado, i. a. eĉ en la latina lingvo. Kaj la forigo de la o-finaĵo ne ekzistas nur en la poezio, ni ofte forigas ĝin eĉ en la parolo, t. e. ĉe la kunmetitaj vortoj, ĉe kiuj ni ne sentas la bezonon aldoni la gramatikan finaĵon de la unua parto. Litkovrilo estas same komprenebla al ĉiuj, kiel litokovrilo. Ke Zamenhof mem en siaj fruaj tradukoj ne uzis ofte la apostrofon, tio ne ĉiam estis je la favoro de liaj tradukoj. (Komparu lian tradukon de Einsam (Heine) al la sama de Zanoni au Kalocsay.)

### GVIDSTELO.

La stato de homa kunvivado estas mizera. La sovaĝaj bestoj en multo estas pli honestaj kaj afablaj ol la kopioj de Dio. Kial? Pro tio ke ni tro multe lasis al profesiaj politikistoj plenumi la interpopolan kontakton kaj direkti la rilatojn inter la nacioj. Politikisto eldiras glorajn vortojn kaj vendas sian animon. La sekreta diplomatio malantaŭ la dorso de la popolo ŝakludas pri la feliĉo de milionoj. Oni nomas la politikon la arto de la eblo.

Ni esperantistoj ne rajtas imiti la "grandajn" homojn. Ni ne rajtas per la buŝo diri ion kaj per la koro pensi ion kontraŭan. Ni tute simple devas esti honestaj en nia rilato al aliaj homoj. Maljusto estas maljusto ankaŭ se la potenculoj provas tion ŝirmi per frazoj. Ni ne rajtas marĉandi pri niaj idealoj, sed ni profundigu ilin per severa studado de homaj rilatoj.

Kiam la hombuĉado estos finita ni kreu mil kaj centmil personajn kontaktojn trans la limojn. Ni kreu tutmondan frataron kiu sin reciproke edukas al homaranoj. Ni spitu la oficialan diplomataron per viva internaciismo. Por ni esperantistoj la devizo estas realigo de la ŝajne nebla. La absoluta postulo pri justo, vero kaj homeco estas gvidstelo, kiun ni neniam perfidos!

Salex.

## Förlagsföreningen Esperantos

u. p. o.

andelsägare kallas härmed till ordinarie årsmöte pingstdagen den 20 maj 1945 kl. 9 f. m. å Stockholms Högskola, Norrtullsgatan 2, sal C.

Ärenden enligt stadgarnas § 11.

Styrelsen.

**LITTERATUR.**

**Språk och fred** av Martin S. Allwood, 30 sidor, 75 öre.

Som nr 6 i Fredshögskolans skriftserie har kommit ett häfte med ovan angiven titel. Först följa 3 avdelningar: Språket och den romantiska nationalmyten, Europas tre stora språkfamiljer, Bättre språkundervisning i skolorna, varefter författaren kommer in på brännbara ämnen under rubriken Språksamfärdselns svårigheter, där som klimax kommer vad professor Edward Sapir vid Chicago Universitet på sin tid yttrade i den utredning "International communication", som han jämte två andra språkmän utgav i London 1931: "Vi se alltså att intet nationellt språk verkligen till sitt väsen motsvarar den moderna tidsålderns analytiska och skapande anda. De nationella språken är alla **väldiga system av intressen i det bestående, som surmulet motsätter sig en kritisk undersökning.** Det kanske chockerar traditionalister att höra, att vi snabbt förflyttar oss mot en punkt där våra nationella språk är nästan mer till hinder än till hjälp för klart tänkande."

Självfallet blir nästa kapitel i häftet ägnat esperanto som både berömmes och kritiseras. Vi få höra något om vårt "onödiga påhäng" ackusativen och vårt tekniska kruz övertecknen.

Författaren slutar med ett kapitel om **interlingvistik**, en vetenskapsgren, som håller på att växa fram och som avser att metodiskt behandla hjälpspråksfrågan. Här gör han ett intressant påpekande om det uppgivande av nationell särart, som krävs av var och en, som på allvar vill lära sig tala ett främmande nationalspråk — givetvis endast (?) under studietiden. Hur t. ex. flertalet språk icke kan talas naturligt utan de gester, som höra språket till. Dessa hårda krav på språkstudier förutsätta både mycket tid och mycket pengar, ja, så mycket att samhället måste träda emellan och — enligt författarens mening — bör frikostigt göra detta.

Motvilligt men ofrånkomligt drivs författaren fram mot ett konstruerat språk som internationellt hjälpspråk. Han vill inte säga, att det redan finns. Det överlåter han åt sina läsare, vilka böra bli många. Priset på häftet tillåter detta.

Broschyren erhålles från Fredshögskolan, Sveavägen 86 (Engqvist), Stockholm.

**T. J.**

**Dro Szilágyi** fick bland andra hyllningar till sin 50-årsdag en inbjudan till Finland att föreläsa vid de finska esperantisternas sommarkurser. Dro Szilágyi hoppas att kunna förena detta uppdrag med de sommarkurser i Sverige, i vilka han skall medverka.

**Vid Nordiska festen** den 25 mars i Sunderby folkhögskola i Norrbotten representerades folkhögskoletankens hemland, Danmark, av en trehövdad delegation med den värderade esperantisten lektor Harald Grönborg i spetsen.

**Portu la esperantan stelon!**



## Meddelande från Esperanto-Institutet

### Esperanto en radio.

La instituto intencas turni sin al la estraro de Radiotjänst kun la peto, ke oni nun denove dissendu Esperantoprogramojn regule. Ni sendis al ĉiuj svedaj esperanto-grupoj peton pri helpo tiamaniere, ke la grupoj kolektu subskribojn de eminentaj personoj en la koncerna loko. 22 lokoj jam faris sian devon, sed kial silentas la ceteraj 100 lokoj? Ĉu tiuj grupoj ne deziras Esperanton en radio?

Inter la ĝis nun kolektitaj nomoj troviĝas episkopo Rodhe en Lund, prof. Collinder en Upsala, parlamentanoj Ernst Eriksson kaj Edvin Berling. Krom tio multaj urbestroj, rektoroj, pastroj, lernejoj, inspektoroj, redaktoroj, prezidantoj de fakorganizoj k. a. gravuloj. La instituto atendas, ke la restantaj grupoj faros sian plejblon prefere antaŭ la 16 aprilo. Proksimume tiam ni nome devos transdoni la petskribon por havi eblecon influi al la radia programo por la venonta aŭtuno.

Fosu vian sulkon!

### Libertempaj restadejoj por esperantistoj.

Ankaŭ ĉisomere okazos somerkurso en Björkås (Dalsland). Kurstempo 1—7 julio. Prelegisto estos kiel pasintjare red. T. Morariu. Sed krom li prelegos ankaŭ instruisto Einar Dahl kaj red. Einar Adamson. Ili prelegos pri "Internacia idealisma kunlaboro post la milito" kaj s-ro Dahl speciale pri "Kiel eduki la junularon por internacia pensado".

Ĉiuj kiuj dum la pasintaj someroj partoprenis la kursojn en Björkås scias, kiel agrable oni pasigas sian libertempon en tiu ĉarma regiono inter bonaj esperanto-kamaradoj. Ankaŭ vi preparu vian partoprenon!

Kurskotizo 5 kr. Loĝo kaj manĝo en pensiono je prezo de 6 kr potage. Informpetojn kaj aliĝojn sendu al S-ro Greger Andersson, Brl. 170, Åmotfors.

\*

Esperantistoj en la orienta parto de Svedlando povas elekti la pli proksiman kurson en Jursla apud Norrköping, se ili trovas la vojon al Björkås tro longa. Pasintsomere multaj esperantistoj kolektiĝis en la bela Esperanto-hejmo de la samideanoj en Norrköping, kaj tie ili pasigis neforgeseblajn tagojn. Interesaj prelegoj, ludoj, banado kaj amika kunestado. Ĉar Esperanto estis la ĉiutaga lingvo, oni sentis sin kvazaŭ en Esperantujo.

La kurso ĉijare okazos 15—22 julio. Prelegistoj estos dro F. Szilágyi "Lingvaj problemoj postmilitaj", Stellan Engholm: "Stilistikaj problemoj en Esperanto" kaj dro Karl Söderberg pri ankoraŭ nedecidita temo.

Kurskotizo 5 kr. Manĝo kaj loĝo 5 kr potage. Sendu vian aliĝon antaŭ 1 junio al S-ro Nils Johansson, Karlshovsvägen 46, Norrköping.

\*

ABF promesis doni ekonomian subvencion.

\*

Se vi intencas partopreni iun el la kursoj, petu monsubvencion de viaj fakorganizaĵoj kaj de la loka ABF.

### Esperanto en lernejoj.

Dum tiu ĉi lerneja jaro multaj Esperanto-kursoj komenciĝis inter lernantoj de popollernejoj, ekz. en Göteborg, Skövde, Karlskoga, Strömsnäsbruk kaj Uddevalla.

Ni atentigas la instruistojn pri la eblecoj aranĝi kursojn en la kadro de "fritidssysselsättningen", nun organizita en multaj urboj. Plej ofte la urboj pagas honorarion por la instruado. Jam nun dum la printempo vi devas antaŭprepari la kursojn, kiuj komenciĝos aŭtune. Vi nome devas fari propagandon inter la lernantoj jam nun.

Espereble ni aŭtune povos peradi infankorespondadon inter Svedlando, Anglujo kaj Francujo.

Esperanto en la lernejoj!

### Somerkurso en Kiruna.

Pro la nuntempaj cirkonstancoj la instituto en interkonsento kun la samideanoj en Kiruna decidis prokrasti la planitan somerkurson en Kiruna ĝis venontsomere.

### Sveda Instruista Esperanto-Federacio (Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20  
Telefon 14 93 43

Göteborg V  
Postgiro 3 14 30

**Skövdeklubbens arbete för folkskolekurser började med framställning till Folkskolestyrelsen, vari hemställdes att styrelsen ville besluta**

**att i princip tillstyrka den gjorda framställningen;**

**att upplåta skolokal(er) för ändamålet;**

**att ställa till kursens förfogande tillräckligt antal skrivhäften, förslagsvis två styck per deltagare;**

**att för varje deltagare bestrida kostnaden för grundbok (lärobok) med högst 1:— kr. per deltagare;**

**att genom lärarna i de berörda klasserna till varje elev distribuera en till barnens målsmän riktad skrivelse med anmälningsblankett för kursen.**

Sedan denna framställning i sin helhet beviljats, bekantgjordes saken i stora artiklar i stadens tidningar, och de omhandlade skrivelserna till barnens målsmän ställdes i ordning och distribuades.

Postkarto el Skövde.

Undervisningen i Esperanto pågår sedan den 14 mars vid Skövde Folkskolor med 48 elever från sjätte klassen, därav 29 flickor och 19 gossar. Samtliga ha skriftligen anmälts till kursen genom sina målsmän.

Intresset är mycket stort. Ett omfattande program har förberetts och kommer att genomföras, bl. a. en ungdomsklubb, pristävlingar, utflykter m. m.

Lärobok: Systematisk kurs i Esperanto av Sep-

**AMIKOJ EN SVEDLANDO! — ĉu vi jam vidis la nunan**

**"SVISAN ESPERON"?**

Ni ne pretendas ke ĝi estas grandioza, sed ni klopodas ke ĝi estu valora kaj helpu al siaj legantoj en la tuta mondo. Kredante ke ĝi sukcesos trovi varmajn amikojn ankaŭ en Svedlando, ni volonte sendos senpagan ekzempleron al ĉiu petanto. "Svisa Espero" aperas multobligata 8-foje en la jaro. Apud la bonegaj Esperanto-verkoj, kiujn viaj svedaj verkistoj eldonas, "Svisa Espero" povos esti interesa legaĵo el alia lando. Ĝi estas redaktata tute en Esperanto, en stilo kaj maniero kompreneblaj ankaŭ por homoj en aliaj landoj.

Sed, pli bone ol mem paroli pri ĝi, ni invitas vin sendi poŝtkarton por ricevi specimenon.

Tutkorajn salutojn al niaj nordaj amikoj!

**Redakcio de "Svisa Espero"**  
**Neuveville (Berne), Svislando.**

pik Malmgren. Folkskolestyrelsen svarar för kostnaderna för läroböcker.

Kore salutas

**Lennart Åberg.**

### Nova esperantokurso en la lernejoj de Gotenburgo.

Sro Bruno Nilsson komencis novan infankurson en Fjällskolan, Göteborg. La nombro de partoprenantoj estas 34.

## 50-jarulino.

**Ebba Persson**, unu el la plej fidelaj pioniroj de nia movado en Hälsingborg, estos 50-jara la 18-an de aprilo nuna. Kiam G. H. Backman en 1909, gvidante kurson pri esperanto kun klaso de knabinoj en popollernejo de la urbo, li kaj lia edzino kunprenis ilin por interesa pilgrimado tra germanaj urboj, kie la bravaj knabinoj en propagandaj vesperoj, aranĝitaj de la kluboj, kantis kaj deklamis esperantlingve kaj demonstris svedan gimnastikon. Inter ili estis Ebba Andersson, poste sinjorino Persson, kiu restadis dum la multaj jaroj unu el la apogaj kolonoj de la vivo esperantista en Hälsingborg. La partoprenantoj de la jarkunveno memorinda en Hälsingborg antaŭ du jaroj certe memoras ŝin kiel la afablan estrinon de la kongresa oficejo, kiun laboron ŝi sindone prizorgis malgraŭ sia multjara malsaneco pro tragika venenigo. La multaj amikoj de Ebba Persson en la tuta esperantistaro kore gratulas ŝin kaj deziras al ŝi feliĉon en pli kaj pli serenaj vivotagoj.

**P. Nn.**

### Korespondado.


Mr Eug. Dieudegard, 5 rue de Bapeaume, **Maromme (S. Inf.)**, Frankrike, kiu gvidas esperantokurson, deziras "ke ĉiu lernanto kaj ĉiu samideano de nia regiono (la Normandujo) povus posedi adreson de fremda esperantisto por ke ili korespondu kun li".

## SEIF Kolono

## La Programarkivo.

De la Programarkivo, kiu estas eldonata je servo de la kluboj, aperos nova numero en bona tempo antaŭ ol komenciĝos la planado de la aŭtuna laboro. Ĝi enhavos teatraĵetojn, kantojn kaj proponojn pri aranĝo de kunvenoj. Ĉiuj kluboj, kiuj havis programojn imitindajn, ĉiuj kluboj kaj gesamideanoj, kiuj havas proponojn pri la programarkivo aŭ kontribuojn al ĝi, estas invitataj kunlabori. La celo de la Programarkivo estas doni al la kluboj kiel eble plej bonajn kaj enhavoriĉajn proponojn pri programoj. Sendu proponojn kaj kontribuojn al: Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm. Sur la koverton skribu ankaŭ: "La Programarkivo".

**SEF-konsulenten**, red. Tiberio Morariu, har under februari-mars haft sin station i Luleå-Boden och kunde den 23 mars hålla avslutning med en



Hr Morariu undervisar fru Irma Persson om släktet homo.

nybörjarkurs i Boden, som ABF ordnat. Vid samkvämet efteråt hyllades red. Morariu för sin undervisning och hr Torsten Tegby, ABF:s lokalavdelnings ordförande för sitt initiativ.

Vi kunna också hylla eleverna, ty dessa beslöto sig på stående fot för att bilda en konversationscirkel i esperanto och att börja arbeta i den omedelbart efter påsk.

**Esperanto i radio.** Det är ännu inte Sverige, det fattiga landet utanför kriget, som kan sättas under rubriken. Det är det sargade Bulgarien, som anmäler sig som god esperanto-etta i radiokören i den nya epok vi gå tillmötes. En esperantist i Tingsryd rapporterar, att han onsdagar kl. 17.30 på våglängd 351 m. lyckas få in Sofias radio under dess esperantokvart, senast med en rapport från "Tjänstemäns och arbetares fackorganisationers kongress", däri bl. a. ingick det svar fältmarskalk Tito sänt kongressen i anledning av en dess hänvändelse till honom. — Vi bli tacksamma för meddelanden från andra, som lyckas få in Sofia. Man bör, sägs det, börja lyssna kl. 17, svensk tid.

## SVEDA KRONIKO

**Skaraborgs läns Esperantodistrikt** har hållit årsmöte å Stadsbiblioteket i Skövde den 18 mars. Årsberättelsen redogör för en av distriktet ordnad föreläsningsserie av dro Szilágyi, för en sommarträff på Mösseberg och en studiekurs vid Axvalls folkhögskola anordnad av Samverkande Bildningsorganisationerna. Ett dominerande inslag i årsmötet den 18 mars i år var frågan om folkskolekurser.

**Gävle. 6. 2. 1945.** La klubo jarkunvenis en kafejo Wiener-Condiss. El la jarraporto oni povas mencii ke la unuiĝo estis vizitata de la esperantoapostoloj T. Morariu printempe kaj F. Szilágyi aŭtune, ambaŭ tre ŝatataj. En junio okazis bicikla ekskurso al Furuvik, dum kiu regis gaja esperantista preskaŭ kongresa atmosfero. Dum la 17 kunvenoj la klubo plej ofte laboris kiel studrondo.

Kiel estraro por 1945 estis elektataj: Gösta Åström, prez., Albert Liljemark, vicprez., Arne Lenner, sekr., Wega Hansson, vicsekr., Gunnar Wesslén, unua kasisto, Erland Holmqvist, bibliotekisto, kaj Signhild Johansson, klubestrino kaj dua kasisto. Anstataŭantoj: Carl Müntzing, Victor A. Östlund kaj Ellen Holm. Revizoroj fariĝis Gunnar Bengtsson kaj Siri Nordling kun Asta Aronsson kiel anstataŭanto.

G. A.

**LULEÅ.** Dum la monatoj februaro kaj marto red. T. Morariu gvidis esperantan kurson en Luleå kaj dum tiu tempo donis al la lernantoj la fundamentajn regulojn en esperanto. Ke li faris bonan kaj ŝatatan laboron oni povis aŭdi en la dankvortoj en esperanto, kiujn s-ro E. Lundkvist dum la festeto post la lasta leciono direktis al la instruisto kaj per kiuj li speciale dankis lin por lia ŝercema kaj simpla maniero instrui.

E. L.

**Grupo Esperantista de Stockholm.** Kunvenoj en la monato marto. La 7-an ni aŭdis de s-ro Gunnar Rosell kiel "tramisto rigardas la pasaĝerojn". En gaja kaj interesa parolado s-ro Rosell sciigis nin pri siaj spertoj kiel tramisto kaj la malfacilaĵoj de la tramista profesio komparebla al tiu de vendisto en preskaŭ daŭre plenplena vendejo, kiu krome balanciĝas. La 14-a estis dediĉita al "lingvaj ekzercoj" sub gvidado de s-ino Julin. Ni tradukis la akompanantan tekston de lumbildoj laŭ gazetaj bildserioj.

La 21-an s-ro Sune W. Ahlm parolis pri "Birka, iama ĉefurbo de Svedlando". Antaŭ ni viviĝis la tempo, kiam la norda apostolo de la kristanismo, Ansgar, vizitis la ĉefurbon de la sveoj.

La 28-an estis aranĝata sub gvidado de s-ro Håkansson batalo inter la estraro kaj aliaj membroj, konsistanta el kvin partoj: 1. Elserĉo de neblaĵoj en laŭtleĝita rakonto. 2. Traduko kaj korekto de eraroj. 3. Identigo de stratoj, konstruaĵoj, monumentoj, urboj en laŭtleĝita detektiva rakonto. 4. Problema bataleto. 5. Alumeta konstruado sur

**p o l y g l o t t**  
**lingva kaj skriba servo**  
**pokalv. 4 stockholm tel. 444400**

tradukoj en ĉiuj kulturlingvoj fare de indiĝenoj kompetentaj pri sciencoj inĝenieraj, jura, medicina kaj ceteraj fakoj.

lernohelpo per korespondado! pedagoga korektado de stilekzercoj en germana, angla, franca, rusa, hispana, greka, latina.

multigrafado de ĉiu speco. moderna leter-reklamo, kovertskribado, distribuo, artaj kaj personaj posedmarkoj, plaĉaj vizitkartoj!

lingvokursoj laŭ rekta metodo. konversaciaj rondoj kun ununure eksterlandaj instruistoj. aliĝu tuj! petu nian prospekton!

sukerpecon. La — nekompleta — estraro estis brile venkata de la "ordinaraj" membroj.

En pluraj kunvenoj ni aŭdis raportojn pri la progresado de la laboroj por la venonta kongreso.

**B.**

**AMAL.** Klubo Esperantista de Amål jarkunveno 25.2. La raportoj estis aprobataj, kaj la estraro ricevis deŝarĝon. La studgvidanto R. Forsberg raportis ke la kluba studrondo laboris vigle kaj havis 23 kunvenojn. La estraro reelektiĝis kaj konsistas jene: R. Forsberg, prez., Leopold Johanson, vicprez., Edv., Gustafsson, kas. kaj koresp. sekr., V. Planman, sekr., kaj K. Ahlstrand, vicsekr. Revizoroj: Ragnar Larsson kaj N. Karlsson. Per kantado de "La Espero" finiĝis la kunveno.

**E. G.**

**ESPERANTO INOM TELEFONTEKNIKEN.**

Laboratorieprov på telefonapparater utföras enligt normer som utarbetats av den internationella rådgivande telefonkommittén CCIF (Comité Consultatif International Téléphonique). För uppfattbarhetsprov läses över en telefonförbindelse, där apparaten ingår, ett antal stavelser med vardera tre ljud: förkonsonantljud, vokalljud och efterkon-

**Svenska Esperanto-Tidningen**  
**La Espero**

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:—. Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

**SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET** (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO** u. p. a., postadress: Box 19071, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET**, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

**INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL** (Sveda Teritorio): Chefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poshtcheka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

sonantljud. Dessa stavelser kallas **logatomer** och skola enligt kommitténs rekommendationer sammansättas av ljud som ingå i **esperanto**. För att proven skola bli så likvärdiga som möjligt var än på jordklotet de företagas, strävar man efter att de i mätgrupperna deltagande personerna lära sig perfekt uttala esperantos ljud. På detta sätt tjänar esperanto inom ett viktigt fack som ett neutralt språkligt hjälpmedel i teknikens tjänst.

**Salex.**

**NOVA ADRESO:**

**Alexandersson**, Jakobsbergsgatan 20 B, Västerås. Tel. 381 69. Postgiro 190976.

**Bygg för framtiden ett högisolerande stenhus till samma eller lägre pris än ett trähus.**

**Y T O N G**

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.**  
**Hällabrottet**

